Federacio de Germanio kaj de la usonaj *Nuffield Foundation, Welcome Trust*, *New York Zoological Society*, kaj ankaŭ de la nederlanda Federacio pri Antaŭenigo de Tropikaj Esploroj. Tiuj kaj aliaj institucioj en Eŭropo kaj Usono, kies intereskampoj estis speciale aplikeblaj por la intencitaj esploradaj programoj en Serengetio, sukcesis akiri plej kapablajn sciencistojn – kaj la bezonatan monon por la planitaj esplorlaboroj.

En 1966 eblis larĝigi kaj plivastigi la projekton danke al donaco de la usona *Ford*-fondaĵo, kiu subtene reagis al la petoj de famaj sciencistoj *Niko Tinbergen* (profesoro ĉe *Oxford University*) kaj prof. *Konrad Lorenz* (estro de Maks-Plank-Instituto pri Etologio en *Seewiesen*, Germanujo). Tiuj institucioj trovis inter siaj studentoj kelkajn zoologojn interesitajn veni al Tanzanio kaj subteni la tie jam laborantajn sciencistojn.

## Kunfondinto de naturprotekta asocio

Sian famecon Bernardo Gĵimeko uzis por la bestoprotektado. Dum tio la simpatia zoo-direktoro kelkafoje intence provokis per ruzaĵoj: li ekzemple akiris enir-rajton en amasbestejon kaj poste kaŭzis skandalon pro la rezultantaj fotaĵoj. En la jaro 1979 li fondis, kune kun aliaj medioprotektantoj, la Asocion por Medio kaj Naturprotektado Germanio *BUND* (“*Bund für Umwelt und Naturschutz Deutschland*“).

Liaj ideoj pluefikas en multaj projektoj – inter tiuj aparte la pluekzistado de la grandaj Naciaj Parkoj en Afriko – kiuj helpas sekurigi la postvivadon de la unika afrika bestomondo. Liaj televidprezentadoj estas neforgeseblaj, en kiuj li ĉiam kunprenis best(et)on el la Frankfurta zooparko, kiu sciavide kaj esplorcele surgrimpis lin dum lia parolado (Bildo 1). *Bernhard Grzimek* mortis la 13-an de marto 1987 ĉe cirkovizito en Frankfurto – precize en prezentado de la cirka tigroprogramero.

**Adreso de la aŭtoro**

*Prof. Dr. Rüdiger SACHS*
*Vor dem Brückentor 3*
*DE – 37269 – Eschwege* / Germanio
<isaesachs@aol.com>

**Priaŭtora informo**

Bestkuracisto. Laboris kiel parazitologo ĉe la serengetia *Michael-Grzimek*-Esplorlaboratorio en Tanzanio dum kvarjara periodo.



# Rememoroj pri *Bernhard Grzimek*

*Harald SCHLIEMANN*

En tiu ĉi jaro 2009, je la naskiĝdato, la 24-a de aprilo, *Bernhard Grzimek* fariĝus centjara. Multaj homoj certe honore rememoris lin kaj omaĝe aprezis liajn nekompareblajn meritojn por la protektado kaj konservado de la naturo – sed nur malmultaj homoj kapablas vidi, malantaŭ la aktiva iniciatinto kaj antaŭpensanta organizanto pri medio- kaj naturprotektado, la veran homon.

Mi renkontiĝis persone kun prof. Gĵimeko la unuan fojon en 1965 kaj tiam nur interesiĝis pri liaj tanzaniaj aktivadoj: ĉar post mia parola doktoriĝekzameno ĉe la Hamburga Universitato mi intencis fari kvarmonatan vojaĝon al Kenjo kaj Tanzanio por kolekti zoologian materialon. Profesorino *Henriette Oboussier*, mia doktoriĝ-patrino, interesiĝis science pri antilopoj, iliaj parencaj rilatoj, iliaj cerbostrukturoj kaj hipofizoj – sed krom la sciencaĵoj antaŭ ĉio pri la afrika kontinento mem.

En Najrobo/Kenjo ni havis fiksan lokon, nome la Instituton pri Veterinarmedicino, fonditan de prof. *R.R. Hofmann*, en kiu ni povis stoki la kolektitan materialon: skeletojn, haŭtojn kaj felojn, cerbojn. Dum vizito de la Instituto pri Anatomio mi hazarde renkontis profesoron *Grzimek*, kiu ĵus vizitis la saman instituton. La granda, bonvolema, meritoplena Gĵimeko – post reciproka prezentado – ridetis “de supre“ (pli ol 1,90 m altstatura!) sur min kaj tuj turniĝis al alia vizitantogrupo. Min treege impresis la afabla vizaĝo de la famulo – li, kompreneble, poste ne plu povis memori la junan biologon renkontitan en Najrobo.

## Gĵmeka projekto en Serengetio

La sekva kontakto kun Gĵimeko estis nerekta, tamen de plej alta graveco. Nia zoologia kolektovojaĝo kondukis nin en Serengetion, por kiu prof. *Oboussier* jam longe antaŭe estis planinta kaj aranĝinta la necesajn kontaktojn, ĉi-foje kun nia faka garantianto d-ro *R.Sachs*. Nia serengetisperta patrono estis veterinaro kaj samtempe entuziasma biologo kun granda intereso pri scienca fundamenta esploro. Post multjara laboro en Namibio li sukcese aliĝis al la “Serengetia Esplor-


Projekto" kaj, laŭ la Ĝimekaj imagoj, devis eltrovi je kioma grado antilopoj – speciale la gnuoj – estas portantoj de parazitoj. Ĝimeko havis la tiam ankoraŭ iom malklaran ideon, daŭropove utiligi la amason da herbovoraj sovaĝbestoj por la tanzania loĝantaro, kaj eble plue por aliaj proteinsubnutritaj homoj en Afriko. Por tio gravas koni la parazitan ŝarĝon kaj aliajn malsanojn de la sovaĝbestoj por valorigi la taŭgecon de ties viando por homa nutriĝo.

Malantaŭ tiaj konsideroj kuŝis la pensado, ke la plej taŭga motivado de homoj por la konservado de naturaj vivospacoj kaj protektado de la tie vivantaj sovaĝaj bestoj estas veki la ekonomian intereson de la indiĝenaj tanzanianoj. Oni tiam ne sciis, ĉu tiu estontec-cela imago de prof. Ĝimek', nome eltiri financan avantaĝon el la konservado de la naturo, poste metos la specio- kaj naturprotektadon sur solidan fundamenton. Ŝajne nur tiel ebligus daŭropova naturkonservado. Poste tamen evidentiĝis, ke la lukra kaj multenspeziga utiligado de sovaĝbestaroj por homa nutrado estas netaŭga instrumento por la naturprotektado. Sed la diskuto pri ekonomia utiligado de sovaĝejaj bestoj tamen rezultigis, ke multaj homoj pretas investi grandajn monsumojn por viziti Afrikon aŭ aliajn landojn kun alloga naturo. Ni bone scias nuntempe, ke la enspezoj el turismo por trialandaj ŝtatoj ne nur estas grava kontribuo al la nacia ekonomio por la lokaj komunumoj, sed ankaŭ decida faktoro por la protektado kaj konservado de la naturo.

### Esploroj ĉe *Michael-Grzimek*-Laboratorio

Neniu alia el la 11 Naciaj Parkoj en Tanzanio (Bildo 1) donis al ni la eblon daŭrigi niajn tutafrikajn studojn pri la cerbostrukturo de antilopoj ol la *Michael-Grzimek*-Memorlaboratorio en Serengetio kaj ties veterinara esplorprojekto en *Kirawira* (vd. mapon en p. 219). Necesas aldoni, ke d-ro *Sachs* restis kelkajn pluajn jarojn en la Serengetio kaj kolektis multampleksan materialon de antilopoj kaj aliaj sovaĝbestoj. Ekde tiam en mia Hamburga instituto kuŝas zorge datumita kolekto pri korpaj kaj organaj pezoj de plej diferencaj antilopospecioj, kiu atendas esploran prilaboron. La scienco ŝuldas dankon al d-ro *Sachs* por la malkovro de multaj ĝis tiam nekonataj vivocikloj de kelkaj helmintoj. Pro sia inklino pri fundamenta esploro, kio ne estas memkompreneblaĵo por veterinaro, li ankaŭ kolektis materialon por studi la interagon inter parazitoj kaj ties mamulaj gastigantoj. La multaj sciencaj publikigaĵoj el tiu ĉi labor- kaj vivoperiodo estis la bazo por lia posta nomigo kiel profesoron ĉe la Hamburga Universitato.






**Bildo 1**: La Naciaj Parkoj de Tanzanio

1. Serengetio
2. Lago *Manyara*
3. *Tarangire*
4. *Arusha*
5. Kilimanĝaro
6. *Mikumi / Selous*
7. *Ruaha*
8. *Kitavi*
9. *Mahale*
10. *Gombe*
11. Insulo *Rubondo*

### Eminentula konkurenco inter periodaĵoj pribestaj

Pasis longa tempo ĝis mi denove kontaktiĝis kun prof. *Grzimek*. En la 70-aj jaroj fondiĝis en Hamburgo la periodaĵo "*Sielmanns Tierwelt*" ("Bestomondo laŭ Silmano"). Tiam mi estis aferdirekta direktoro de la Zoologia Instituto kaj Muzeo de la Hamburga Universitato. La ĉefredaktoro de la freŝnaskita periodaĵo, *Henning Saures*, serĉis konsult-biologon. Ni tuj rimarkis reciprokan interkonsenton bonharmonian – komenco de sencoplena kunlaboro. Multajn jarojn mi science konsultis la redakcion kaj progresige akompanis la iom statikan sed bele per bildoj ornamitan ĵurnalon, ankaŭ ĉe ĝia transiro en la eldonejon *Paul Parey*.

Pro manko de monrimedoj oni venis al la ideo, kunfandi la Silmanan "Bestomondon" kun la jam en 1960 de *Grzimek* fondita revuo "*Das Tier*" ("La Besto"). Ambaŭ aŭtoroj interkonsentis kaj la "nova" revuo portis certan tempon la nomon de ambaŭ sciencistoj. Sed bal-

daŭ denove eldoniĝis sole "*Das Tier*", por kies eldono Gĵimek' tre intense, Silman' nur tre senzorge sin engaĝigis.

Dum la ĉiumonataj redakci-kunvenoj ĉiam ĉeestis prof. Gĵimek'; afereme kaj fake preparita li batalis leonece por la redaktado, precipe por siaj speciale gravaj enhavopunktoj. Tiuj renkontiĝoj, al kiuj komence partoprenis ankaŭ Silmano, estas neforgeseblaj. Ambaŭ sciencistoj ja ĝuis en la publiko la statuson de "eminentuloj" kun la famo de televid-steloj, kies samĉambra renkontiĝo naskas pikpikan atmosferon. Gĵimeko sciis kiel reprezenti sian pozicion kun emfazo kaj sukceso, kaj tuj evidentiĝis, ke li ĉiujn siajn intencojn tre zorge, longtempe kaj senkompromise planis kaj ili, spite al kontraŭeco, preskaŭ ĉiam akiris ĝeneralan akcepton. La iom cedema *Sielmann* havis neniom por obĵeti aŭ kontraŭdiri, kaj baldaŭ forlasis la interkonsiliejon.

Nun mi ofte kaj regule havis la okazon, persone renkontiĝi kun la fama aktivisto por natur- kaj bestprotektado, kun longdaŭraj postkonferencaj interparoladoj – ofte ĝis ne plu funkciis publikaj transportiloj. Ĉiu persona "nealirebleco" malaperis de Gĵimek' kaj cedis spacon por stimulaj kaj instigaj pensoj. Li estis homo forte gvidata de sia prudento – oni certe ne povis atendi sentimentalulon aŭ multemocian homon. Sed oni povis paroli kun li kaj komuniki sen ĉiam konscii pri liaj meritoj kaj publika signifo. Li estis granda homo, kiu firme staris sur sia fundamento kaj radiis kapablecon sen bezono de glora aŭreolo.

Tuŝis min persone kaj gaje, kaj estis granda honoro por mi, ke post la subita morto de Gĵimek' en 1987 la redakcio kaj eldonejo petis min transpreni la oficon kiel eldonanto kaj daŭrigi la aperadon de la periodaĵo laŭ Gĵimeka intenco. Tuŝis min rememore al *Bernhard Grzimek* tre malgajige, ke la ĵurnalo "*Das Tier*" 13 jarojn post lia morto ĉesigis la eldonon pro malamika konkurenca transpreno de alia eldonejo.

**Adreso de la aŭtoro**
*Prof. Dr. Harald* SCHLIEMANN
*Ünner'n Diek* 2
DE – 25724 – *N e u f e l d* (*Krs. Dithmarschen*)
GERMANIO

**Priaŭtora informo**

Profesoro pri zoologio ĉe Zoologia Instituto kaj Muzeo de la Universitato Hamburgo, Germanio.



# *Bernhard Grzimek* – naturprotekta antaŭpensulo kaj obstinulo

*Rüdiger* SACHS

Zoologo kaj veterinaro, zoodirektoro kaj naturprotektanto, libroaŭtoro kaj bestofilmisto, televidstelo kaj mon-donac-kolektanto: la 24-an de aprilo 2009 profesoro d-ro *Bernhard Grzimek* (Gĵimeko) fariĝus cent jarojn. Kiel preskaŭ neniu alia li akcentis, ekde la 1950-aj jaroj, la temon "Bestoj kaj Naturo" – ne nur en Germanujo. Ankaŭ se lia nomo pleje estas konata pro la libro kaj filmo "Serengetio nepre ne mortu" kaj siaj 30-jardaŭraj televid-elsendaĵoj "Spaco por bestoj", li estis multe pli ol "la televida bestoprofesoro". Gĵimeko esence pre-



**Bildo 1**: *Bernhard Grzimek* serĉas en la veterinara esplorejo *Kirawira* (vd. la mapon en paĝo 219) taŭgan foto-objekton por sia gazeto "La Besto" ("*Das Tier*") (Foto: *R. Sachs*)